Miĉjo opinias:



"Abonu nun por 1976!"

===================

LVP

**PILO-PRESS**

Internacia
Informservo

Eldonanto/Herausgeber:
Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Tel. (0911) 46 36 49; 51 42 69

N-ro 41/1975 19 nov 1975
Aperas ĉiusemajne

## Eŭropa Esperanto-Kongreso

Eindhoven (pp) - Nuntempe estas formata Honora Komitato por la Eŭropa Esperanto-Kongreso 1976. Ĝis nun aliĝis:

Mag. J.J. van der Lee, urbestro de Eindhoven

S-ro J. C. v.d. Harte, provincestro de Norda Brabanto

Prof. D-ro H. Brugmans, em. rektoro de la Eŭropa Kolegio en Bruĝo, Belgio

S-ro R. v. Elslande, ministro por Eksterlandaj aferoj de Belgio

S-ro Molenaar, prezidanto de la Eŭropa Movado en Nederlando

Mag. A. C. Leenders, skabeno pri Kulturaj Aferoj de Eindhoven.

Dum la kongreso prelegos d-ro Werner Bormann, vicprezidanto de UEA pri la "Ekonomikaj aspektoj de la lingvodiverseco" kaj inĝ. Hans Bakker (filo) pri "Sekvoj de lingva superregado".

Por la kursanoj de "Esperanto Programita" el ĉiuj Eŭropaj Landoj estos la ebleco fari ekzamenon "Fina Testo". Okazos ankaŭ kelkaj buŝaj lecionoj.

Informojn petu de la kongresa sekretario: Floraplein 23, Eindhoven, Nederlando.

## EKI - etikedservo

Crailsheim (pp) - EKI-Instituto por Esperanto en Komerco kaj Industrio alvokas ĉiujn esperantistojn, kiuj havas iujn rilatojn al komercaj kaj industriaj entreprenoj, utiligi tiujn rilatojn. Ni proponu al ĉiuj produktantoj, meti sur la varojn ne nur nacilingvajn tekstojn, sed krome esperantlingvan tekston por varnomo kaj uzinformo. Ju pli tiaj varoj (haŭtflegiloj, medikamentoj, ludiloj kaj ĉiuj en vendejoj ofertataj varoj) montras esperantlingvan tekston, des pli Esperanto estos atentata, diskutata, eble lernata.

Fremdlingvanoj, ekz. el franca, itala, hispana, portugala, rumana lingvo-regionoj komprenas ofte tuj la esperantlingvan tekston. Se temas pri traduko, skribu al EKI-oficejo, poŝtkesto 440, D-718 Crailsheim, FRG, aŭ al EKI-oficejo, Dannenstraat 9, B-3581 Achel, Belgio.

## Ludwig Goppel mortis

Regensburg (pp) - La 17-an de novembro 1975 mortis en la aĝo de 74 jaroj Ludwig Goppel, presejestro, eldonisto , esperantisto. Kiel direktoro de Limburger Vereinsdruckerei li fondis en la 50-aj jaroj Esperanto-fakon, kiu eldonis Esperantolernolibrojn, vortarojn kaj literaturaĵojn. Li eldonis Esperanto-Post, kiu poste kunfandiĝis kun la Munkena "La Ponto" en "Germana Esperanto-Revuo". Antaŭ la milito li estis redaktoro kaj kunlaboranto ĉe Heroldo de Esperanto. Li ankaŭ faris Esperanto-tradukojn kaj estis distingita per la "Honora Insigno" de GEA. Unu el liaj fratoj estas la ĉefministro de Bavario, Alfons Goppel.

Zamenhof-festoj

Nürnberg (pp) - Krom la jam anoncita kunveno en Munkeno, la 13-an de decembro, ni informas pri jenaj Zamenhof-festoj:

14.12.75 Sarlanda Esperanto-Ligo en Jugendherberge Homburg-Sanddorf, komenciĝo je la 10a horo. Prelegoj:
Günther Becker, Zamenhof kaj lia Esperanto, hieraŭ kaj hodiaŭ
R. Haupenthal, Biografia skizo pri la vivo de Zamenhof.

15.12.75 GEFA-membroj kaj Esperanto-amikoj de Essen/Köln en Auslandsinstitut Dortmund, Arndstr. 30 A, komenciĝo je la 15a horo.

Jarfinaj aranĝoj

19-a Internacia Seminario de GEJ

La tradicia seminario de Germana Esperanto-Junularo okazos ĉi-jare Cuxhaven-Berensch, en regiono kie oni fieras pri sia klimato, pri siaj fokoj kaj sia pejzaĝo, inter marĉo, erikejo, 30-metra monataro kaj la maro.

El la programo: Prelegoj, laborgrupoj, kursoj, membrokunveno de GEJ, distraĵoj. Prelegoj:

D-ro Werner Bormann: Konkurenco inter grandaj naciaj lingvoj, pozicio de la germana, FR-germana eksterlanda kultur- kaj lingvopolitiko, ministeria decidprocedo rilate lingvoinstruadon"

Winfried Schumacher: Lingva lukto kaj dulingveco en moderna Grekio

Giorgio Silfer: Sciencfikcio

Petu informojn kaj aliĝilojn ĉe Guido Brandenburg, 4401 Westbevern, Brinker Damm 24, FRG

Pedagogia seminario de SEL

Sub la temo "Metodiko kaj didaktiko de la Esperanto-Instruado. Teorio kaj praktiko" okazos pedagogia seminario en Neustadt/Weinstr., naturamika domo de la 27.12.75 ĝis 3.1.76.

Prelegoj: Karl Burger, Elementoj de lernolibra didaktiko
R. Haupenthal, Esperanta literaturdidaktiko
H. Sonnabend, La signifo de lerneeloj - Esperanto kiel didaktika bazo
Jean Thierry, Kiel lingvolerne profiti de la legado?
Ivo Lapenna, La Esperanta parolarto

Informojn donas: Sarlanda Esperanto-Ligo, 6602 Dudweiler, Franz-Schubert-Str. 26

***********

18-a Eŭropa Semajno

De la 12a ĝis la 17a de aprilo 1976 okazos la 18-a Eŭropa Semajno en Studienhaus Wiesneck, D-7801 Buchenbach apud Freiburg, FRG.

La ĝenerala temo estos la studado pri la funkciado de la eŭropaj institucioj.

Restadoprezo estas 100 GM aŭ 1600 b.fr. La partoprenantoj, kies nombro estas limigita je 40, ĝuas vojaĝsubvencion.

Aliĝi povas ĉiu instruisto kaj studento, kiuj deziras plikonatiĝi kun la eŭropaj institucioj.

Laborlingvoj estos la franca, la germana kaj la nederlanda kaj Esperanto, se sufiĉe da esperantistoj aliĝos.

Informojn donas: Sekretariejo "Eŭropa Semajno", s-ro R. Busse, 1, rue de Crehen, B-4280 Hannut, Belgio.

Esperanto en Radio

Radio Zagrebo. Escepte tiu stacio elsendos ĝian ĉiumonatan programeron"Respondoj al la ricevitaj leteroj" kaj "Superrigardo pri la ricevitaj publikaĵoj" por novembro jam vendrede, je la 21a de novembro, ĉar la lasta elsendo de la monato estos dediĉita al la "Nacia festo de Jugoslavio". Pri tiu rubriko s-ino Emilija Lapenna, parolantino de la Esperanto-elsendo de Radio Zagreb, skribas jenon:

"Bedaŭrinde, mi ne posedas miraklajn kapablojn kaj havante je dispono nur 10 minutojn kaj por respondoj al la ricevitaj leteroj kaj por la "superrigardo pri la ricevitaj publikaĵoj", pri ĉio povas esti diritaj vere nur kelkaj vortoj. En tiun programon de la 31-a de oktobro eniris "vortoj" pri 28 eroj! Jes, en malneto mi havis pli da teksto pri viaj eldonaĵoj, sed tajpante mi vidas ke la teksto ĉiam tro kaj tro longiĝas kaj tiam mi devas draste mallongigi mian propran malneton. Sed tia estas radio-fako." Kaj la aluditaj "vortoj" pri la PILO-eldonaĵoj tekstis jene:

"Eŭropa Esperanto-Revuo, sendependa internacia gazeto el Nurnbergo, samaspekta al la antaŭa Germana revuo, sian duoblan julio-aŭgusto numeron ornamis per foto de plaĉa Japanino. La plimulto de la artikoloj okupiĝas pri la ĉijara Universala Kongreso en Kopenhago. La agema redaktoro de Eŭropa Esperanto-Revuo Ludwig Pickel sendis al ni ĉiujn septembrajn kaj oktobrajn numerojn de PILO-PRESS, internacia informa servo el Nürnberg, Germanio, ĉiam akurata, ĉiam plena de freŝdataj novaĵoj. Menion ĝi forgesas publikigi. Ĉifoje ĝi ne forgesis omaĝi la 85-jaran datrevenon de apero de "La esperantisto", la unua esperanta gazeto, kies naskiĝloko estas la nuna domicilo de PILO-PRESS, Nürnberg. 85 jarojn la movado intense floras en tiu germana loko, gratulinde."

Dankon al Zagreb pro la afablaj vortoj!

Varsovio dissendis al la aŭskultantoj sian prospekton plaĉan kaj koloran por la tempo de Novembro 1975 ĝis Majo 1976 kun ĉiuj necesaj informoj. En ĝi ni legas: "Nia Redakcio, eniranta la belan aĝon de matureco - la 17-jaron de sia ekzistado - kiel sian plej grandan atingaĵon opinias la akiron de la vasta, tre sindona aŭditorio, aro da aŭskultantoj, kun vastaj interesiĝoj, impresiĝemaj, vigle interesitaj pri niaj elsendoj, iliaj enhavo, formo kaj lingvaĵo.

Specialan simpation kaj amikecon niaj aŭskultantoj sentas por nia lando - la patrujo de Ludoviko Zamenhof kaj Esperanto. Oni eĉ povas - sen timo fali en troigon - diri, ke esperantisto signifas: amiko de Pollando..."

Cetere Varsovio elsendas ĉiutage je jenaj tempoj kaj ondoj:

| | | | |
|---|---|---|---|
| 6,00 horo | 41 m (7 270 kHz) | 49 m (6 135 kHz) 200 m (1 502 kHz) | 75 m (3 955 kHz) |
| 16,30 horo | 31 m (9 675 kHz) | 31 m (9 540 kHz) | 41 m (7 145 kHz) |
| 22,30 horo | 49 m (6 135 kHz) | 75 m (3 955 kHz) | 200 m (1 502 kHz) |

Interesuloj petu la programfolion de Pola Radio, Esperanto-Redakcio, Poŝtkesto 46, PL-00-950 Warszawa 1, Pollando. Atentu ankaŭ la anoncon pri la nova konkurso sur paĝo 4!

********

Pilo-Press: Jara abonprezo 30,- GM, pagebla al Ludwig Pickel, D-85 Nürnberg, Poŝtĉekkonto Nürnberg 819 56-851

# Konkurso de Pola Radio

**10-tagaj ekskursoj**

**valoraj objektaj premioj**

atendas la eksterlandajn geaŭskultantojn de Pola Radio, kiuj donos respondojn al jenaj demandoj de nia konkurso:

**1) Kion vi opinias pri la rolo de la sindikatoj en la solvado de la aktualaj problemoj de la laborula mondo.**

**2) Kion vi scias pri la kreiĝo kaj agado de la Monda Federacio de la Sindikatoj?**

**3) Kiujn virinojn vi konas, kiuj – laŭ via opinio – ludis grandan rolon en la internacia vivo aŭ havas meritojn por via lando?**

Respondo al unu el la supraj demandoj rajtigas al partopreno en lotado de la premioj.

La respondojn ni petas sendi laŭ la adreso:

**Polskie Radio, PL-00-950 Warszawa, Poŝtkesto 46, Pollando**

– en kovertoj signitaj per la devizo „Konkurso" –
ĝis la 31-a de decembro 1975 j. (decidas la dato de la poŝta stampo).

La rezultojn ni anoncas en la dissendoj de la Pola Radio por Eksterlando la 31-an de januaro 1976.

La ekskurso de la laŭreatoj de la ĉefaj premioj okazos en periodo indikota de la Pola Radio.

Ni deziras bonŝancon en la lotado de la premioj.

Partoprenu mem la konkurson kaj partoprenigu aliajn.

POLSKIE RADIO
Warszawa